



Subtene al la regiona, landa kaj loka agado



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, François Lo Jacomo

ENHAVO n-ro 3 > • Novjaro • ILEI Italio • AMO 82 • Multlingva vortaro • 28a TEK < Jan 8

Novjara saluto por la negregorianoj

Ni deziras agrablan novan jaron al niaj ortodokskristanoj kiuj ja nombras centon da miloj da esperantistoj. Ni kaptas la okazon deziri bonan novan jaron al ĉiuj el niaj samideanoj, kiuj uzas alian kalendaron ol la greogrian, kaj kiuj sekve festas alian nov-jaron (aŭ eble festas du novjarojn jare 😊).

La ortodoksa novjaro en 2022 okazos en la 14a de januaro; la ĉina novjaro okazos en la 1a de februaro,

En Irano marto 24, en Nepalo kaj partoj de Barato la novjaro ekos en la 14a de aprilo. Noti tion aparte por ĉiu negregoria mondparto okupus la kvaronon de niaj komunikaĵoj. Do, ĉiu negregoriano sentu sin salutata kaj rekonata per ĉi tiu unu saluto.


La leciono de nia bondeziro? Esperanto estas monda lingvo, sekve ĝi devas respekti mondajn kutimojn. Esti esperantisto devas signifi samtempe esti interkulturisto. La aparteno al tiu tutmonda familio trudas al ni la devon iomete kompreni la kulturojn de niaj ĉiulandaj samideanoj.



EKO predikas 1

**La jaro 2022: Jen tio muzike:
kunkantu: DU DI DU DU!**

Dankon al Perlo Miela pro la notoj



ILEI en italo kontribuas al nia scienca literaturo

"Ĉu vi vere kredis, ke ni parolos Esperanton?" demandis Francesco De Gregori antaŭ jaroj, en unu el siaj kantoj. Milionoj da esperantistoj tra la mondo daŭre kredis je tio; per etaj paŝoj oni ekviglas ankaŭ en lernejoj per interesaj projektoj. La sukceso de tiuj iniciatoj montris, ke studi la internacian lingvon faciligas la lernadon ankaŭ de la itala kaj de fremdaj lingvoj.

Estas precizaj kaj ampleksaj studoj pri la temo, kolektitaj en verko, kiun Alessandra Madella, vicprezidantino de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), estas nun finpreparanta por eldono. Surbaze de la datumoj kolektitaj en eksperimentoj Italaj kaj internaciaj, Esperanto, krom esti studprepara por fremdaj lingvoj, estas facile lernebla, utilas por plikonigo de la gepatra lingvo kaj krome helpas la integriĝon de lernantoj kun disleksio.

Tiuj ĉi projektoj gajnis gravajn premiojn, kiel lastekzemple de Eŭropa Unio la Multlingva akcelilo (akcelilo de plurlingveco) elpensita en 2017 de Zlatko Tišljar, sukcese spertita en bazlernejoj kroataj, slovenaj kaj bulgaraj. Per la studo de Esperanto eblis akceli je 25-30% la lernadon de pliaj fremdaj lingvoj; la 'akcelilo de plurlingvismo' do ricevis la Eŭropunian Kvalit-Markon por lingvoj en 2021. En ĉi tiuj semajnoj komenciĝas en Toskanio projekto bazita sur ĉi tiuj internaciaj spertoj, titolita "30 oraj horoj", ankaŭ por plibonigi la rezultojn de niaj mezlernejoj en la testadoj de la nacia taks-instituto INVALSI.

"30 ore d'oro" (30 oraj horoj) estas prestiĝa projekto, kiun la LKK de la ILEI-kongreso prilaboras kune kun la Regiona Lerneja Oficejo, kaj kiu kulminos en la somero de 2023 per la monda kongreso de esperantistaj instruistoj okazonta en Marina di Massa.

De Massimo Acciai

AMO 82 fruigis sin al januaro!

Rezulte de niaj eltrovoj el antaŭaj AMO-seminarioj, ni trovis je nia granda surprizo, ke niaj Aziaj landoj Ĉinio, Japanio kaj Koreio havas grandan mankon de junuloj. Evidente, nia tasko estas okazigi novan seminario. Ĉinio estas la plej granda lando en la kalkulado de UEA. Do, seminario tie povos havi grandan efikon. La ĉina LA, ĈEL ja organizos kunsidon pri tio por la ĉina junularo, do tio logike estu la dato por la seminario:



La 28a de januaro estos la dato por tiu seminario. Ĝi okazos per Voov, kaj ni vigle laboras aldoni parton per Zoom, por permesi pli vastan partoprenon. La du partoj eble okazos teknologie aparte, sed teme ligitaj. Pri Zoom kaj UEA-viva kunlaboras Irano. La temo restas "Pli da junaj membroj tra Azio." Ni anoncos la precizajn alirajn eblojn.

Esperanto en multlingva multtema vortaro

Multidic estas tre granda franca-esperanta vortaro kun pli ol 50 000 kapvortoj, kiu estas kompilaĵo de pluraj fakaj vortaroj (medicina, matematika, fervoja, ornitologiakt.) kaj de libroj de frazoj kaj proverboj. Multidic ankaŭ enhavas inversan esperantan-francan vortaron. Multidic estas alirebla ĉe <http://www.bertin.biz/>

Multidic estas ankaŭ instalebla en Androida poŝtelefono. Ĝi funkcias poste senpage sen retbezono.

Sed mi ankoraŭ ne sukcesis registri MULTIDIC en la Androida Play Store (mi bezonas helpon por tio, do se vi havas tiun sperton, vi estas bonvena). Necesas do elŝuti ĝin el la retejo <http://www.bertin.biz/> kaj permesi instalon de ekstera programo. Multidic bezonas aliron al la memoro de la poŝtelefono por registri la vortarojn.

Christian Bertin, Francio

LA 28a TEK (Togolanda Esperanto-Kongreso)

La 25-an kaj 26-an de decembro 2021 okazis la 28-a TEK (Togolanda Esperanto-Kongreso) en Instituto ZAMENHOF(IZo), Lomeo, Togolando, kun trideko da kaj esperantistoj membroj aliĝintaj al UTE kaj pagintaj la diversajn kotizojn kaj kelkaj gelernantoj de Instituto Zamenhof.



La unuan tagon, la partoprenantoj interkonatiĝis, kaj poste spektis Esperanto-filmojn. La duan tagon, la prezidantoj de UTE bonvenigis la kongresanojn, kion sekvis la kantado de la Esperanta himno, poste de kvizo kaj variaj programeroj. Dum tiu ĉi aranĝo, lernantino de IZo 11-jara kun la nomo MBA-MANTSANG Queenny ricevis premiojn. Ŝi partoprenis ankaŭ la AMO-Seminarion tre diligente. Ŝi mirigis ĉiujn per sia lingvo-uzo kaj aparte per siaj precizemo kaj diligenteco. La kvizon gvidis s-ro KEDEGADZI Ezekiel.

REZOLUCIO DE la 28a TEK

Konsciiĝante pri la stato de la Esperanto-movado Togolanda, la tridekon da esperantistoj partoprenantaj la 28-an TEK la 25-an kaj 26-an de decembro 2021 proponas :

- 1 La komitato de UTE reorganizu la laborojn de la asocio surbaze de la dokumento EPI-IPE. Plie, la komitato de UTE atentu la celaron kaj rekomendojn de la 81a AMO-Seminaro de UEA okazinta de la 23-a ĝis la 25-a de decembro 2021 en Lomeo, Togolando (vidu sube)
- 2 La laboroj de UTE koncernu ankaŭ la klopodojn, ke la esperantistoj povu perlabori per siaj lingvosciroj Esperantaj.

Rekomendoj de AMO 81

VIZIO

Lerni Esperanton por propra disvolviĝo ĉia kaj por la disvolviĝo de via grupo.

MISIO

Pago de membro-kotizo kaj ĉiuj aliaj kotizoj de la grupo
Starigo de mondonaj aferoj postulantaj la uzadon de Esperanto
Profesiigi la instruadon kaj praktikadon de Esperanto

SPECIFAJ REKOMENDOJ

- 1 Landoj asocioj estu (re)starigitaj en Afriko
- 2 Starigado de fakaj asocioj en Afriko aŭ penetrado en Afrikon de jam ekzistantaj fakaj asocioj
- 3 Esperanto estu ankaŭ fonto de ekonomiaj aferoj.
- 4 Intensigita estu la kunlaborado de afrikaj esperantistoj kun ĉiuj ajn Eo-organizaĵoj internaciaj kaj ankaŭ kun neesperantistaj organizaĵoj
- 5 Por la disvastigo de Esperanto en Afriko, ties anoj kalkulu pli je propraj fortoj/rimedoj ol je tiuj de aliaj homoj

Plia romano en Esperanto – Albanio kontribuas

Aperis en Esperanto-traduko la romano “La Perdinto”. La aŭtoro estas Fatos Kongoli. Dek jarojn antaŭe aperis lia romano “La Hunda Haŭto”. Tradukis ĝin denove sinjoro Tomasz Chmielik el Swidnik, Pollando, laŭ la tradukoj al la germana kaj franca kun rekontrolo kontraŭ la albana originalo.



===== vortoj: 1070 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021**. Vidu ilin laŭjare, kun enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedlistoj.